

Theodor Storm,

## Fore

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La erikejo kuŝas en  
 la varma tagmezsuna brilo;  
 kaj ĉirkaŭ la ŝtontomboj jen  
 ruĝbrilo flugas tra l' trankvilo.<sup>3</sup>  
 La herboj floras, la odor'  
 en la aeron ŝvebas sor.

Skaraboj hastas tra l' herbar'  
 en siaj bluaj kirasetoj,  
 pendigas sin la abelar'  
 ĉe l' de l' erik' sonoriletoj.<sup>4</sup>  
 Svingiĝas birdoj tra l' aer' –  
 alaŭda kant' en la eter'.

Prilumigite de la sun'  
 kaduka staras jen kabano,  
 rigardas el la pordo nun  
 abelojn siajn kamparano;  
 kaj lia filo apud li  
 eltranĉas fluton jen por si.

...

---

<sup>3</sup>aŭ: ruĝbrilo flugas en trankvilo.

<sup>4</sup>aŭ: al de l' erik' sonoriletoj.

Vibradon de l' tursonoril'  
apenaŭ aŭdas la oldulo,  
ekdormas li en la trankvil',  
fermiĝas sonĝe la okulo.  
- Ne venis la malkvietec'  
de l' nova temp' al ĉi solec'.

*Traduko de la Germana poemo "Abseits" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2001-04.*

*MR-348-1b / Arg-182-368 (2004-02-24 08:11:42)*